ERIKO MALATESTA

•

# ANARKIO KAJ ORGANIZO

K. A. TEKSTOJ...

•

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
116A 1977 4 FF

# E R I K O   M A L A T E S T A,
# G R A N D A   R E V O L U C I U L O

La tuta vivo de tiu ĉi homo, kiu mortis 78-jaraĝa, estas dediĉita al la liberigo de l'proletaro. Neniam li havis la plej etan personan ambicion, nek emon ordoni al aliaj aŭ sin trudi kiel ĉefo. Simpla kaj modesta unuavide, li estis kompreneble la egalulo de ĉiuj bonintencaj homoj; sed persista en sia agado kaj akceptante tiom pli da respondeco, ke li ne agis en person-interesa aŭ ambicia celo, li sciis kontraŭstari al ĉiuj subpremantoj, al ĉiuj estremuloj. Li estis profunde amata de la subprematoj - kaj eĉ la subpremantoj respektis lin.

## Lia junaĝo

Naskiĝinta en 1853 en Sankta Maria de Kapua Vetere, loko, kiu okupas la spacon de l'antikva Kapuo, sed kiu prezentas nenian agrablaĵon plu, Malatesta grandiĝis meze de loĝantaro, premata sub multjarcenta jugo, tenata en malklero de la pastraj helpantoj de l'politika tiraneco.

Kiel la plej multaj revoluciuloj, li precipe per profunda sento pri socia maljusto estis kondukata en la vojon de l'Revolucio. Sed la influo de l'Bakunina propagando - tiu lasta loĝis en Napolo kaj en Kampanio de 1865 ĝis 1868 kaj formis tie malgrandan socialistan kernon, kiu estis la ĝermo de l'loka sekcio de l'Internacio, fondita en 1869 - ŝajnas esti difine efikinta sur la formon de liaj ideoj. Li jam estis akceptinta la anarkismon, la kolektivismon kaj ateismon, kiujn Bakunin predikis en Italio depost 1865, kiam li unuafoje ekkontaktis kun li en 1872, en Zuriko. Deveninta de l'bonhava burĝaro, destinita por liberala kariero, Malatesta ne hezitis rezigni je ĉiuj privilegioj de sia socia situacio kaj forlasi siajn universitatajn studojn, dekiam li sentis la urĝegan neceson batali por la emancipo de l' popolo. En sia fervoro de novkonvertito li estis ia speco de vaganta kavaliro, de ĥimerema mondjustiganto.

Kvankam li neniam rakontis sian vivon - kaj tio estas granda domaĝo, ĉar liaj memoraĵoj estus almenaŭ same interesegaj kiel tiuj de Kropotkin - oni trovas en liaj verkoj kelkajn memorojn, kiuj malfermas al ni horizontojn pri lia spiritostato kaj tiu de liaj junaj batalkamaradoj. En sia antaŭparolo al la libro de Netlaŭ "Bakunin kaj la Internacio en Italio", li diras, ke la Internacio estas enkondukita en Italio de burĝoj, kiuj, pro amo al la justo, dizertis sian klason.

"Jam anarkistoj konvinkitaj, skribas Malatesta, ni volis renversi la ekzistantan registaron kaj lasi al la amasoj, liberigitaj el la armea kaj polica subpremoj, ekposedi la riĉaĵojn kaj organizi la novan socian vivon. Ni havis mistikan kredon en la virto de l'popolo, en ĝia kapablo, en ĝiaj instinktoj por egalo kaj libero."

Kaj en tiuj ĉi skribitaj paĝoj, kiuj estas rerigardo sur lian tutan vivon de aktivulo, li rekonas, ke liaparte ekzistis kompleta eraro rilate la psikologion de l'amasoj ankoraŭ plene nesciaj kaj malorganizitaj, kun kiuj li unue kontaktiĝis : "La malsato, kiam ne ekzistas konscio pri la propra rajto kaj ideo, kiu gvidas la agon, ne produktas revoluciulojn."

De l'ribelo de Benevento ĝis la Internacio.

Oni malfacile povas imagi, ke pasis apenaŭ duonjarcento (en 1932) depost la ekspedicioj de Malatesta al Kastelo de l'Monto, malnova feŭda kastelo, kie el tricent konspiruloj al rendevuo venis nur tri, kaj en la provincon de Benevento, kie bando el tridek homoj ekkaptis malgrandan urbdomon en la montaro kaj okupis ĝin en la nomo de l'socia revolucio, konfiskante la trezoron por ĝin disdoni al la loĝantoj, kaj detruante la magistratajn aktojn, kaj kie maljuna pastro salutis ilin kiel verajn apostolojn de dio. La ribela ago tiutempe estis en la okuloj de Malatesta kaj liaj amikoj la plej bona rimedo de propagando. Kaj fakte ĝi servis al la propagando pro la enkarcerigo de l'ribelintoj, la sekvanta proceso kaj el ĝi rezultanta disvastiĝo de l'ideoj.

En tiu ĉi legendeca atmosfero Malatesta pasigis parton el sia junaĝo, kiun oni povus nomi romantika, se ne aliaj elementoj de scio kaj sperto ekmaturiĝus. Vojaĝoj eksterlanden kontaktigis lin kun rondoj tre diferencaj de lia

naskiĝlanda medio, kvankam la sudlandanoj en ili estis la plimulto.

Ĉe la Berna kongreso de l'Internacio (tiam disigita de l'marksista trunko) en 1876, la gvidideoj de lia revolucia aktiveco estas plene formitaj : la kongreso de l' itala federacio, kiu komenciĝis kelkajn tagojn antaŭe en Florenco, adoptis la anarkistan komunismon, kiu komunigas la laborprodukton, kaj la formulon : "de ĉiu laŭ siaj rimedoj, al ĉiu laŭ siaj bezonoj". Tiu vidpunkto restis la fundamenta ideo de Malatesta.

Li bone konis la ekonomiajn teoriojn de Marks kaj plene akceptis ilin. "La libera ludo de l'naturleĝoj en la socio plenumos la homar-destinojn", li diris ĉe la Berna kongreso. Tamen pli malfrue li plene liberigis sin de tiu speco de fatalismo. La Internacion li komprenis ne kiel ekskluzive klasan organizon : "Ĝi devas celi la emancipon de l'tuta homaro kaj unuigi sub sia standardo ĉiujn revoluciulojn sen klasa distingo" (Berna Kongreso).

Pli malfrue (1904) Malatesta agnoskis per jenaj vortoj, kia estis la vera karaktero de liaj rilatoj kun la Internacio : "Ni estis antaŭ ĉio membroj de l'sekretligo (fondita de Bakunin) kaj kiel tiaj ni fondis sekciojn de l'Internacio. La Internacio en Italio ne estis federacio el laboristaj societoj, sed pure politika societo por la celoj de l'Ligo."

La tendenco trudi sian aŭtoritaton kaj komandi ne ekzistis ĉe Malatesta, sed la ideo pri grupiĝoj anarkistaj, kiuj agas kiel fermentoj sur la amasojn instinkte revoluciajn, restis unu el liaj direkt-ideoj. La ribel-problemoj venkis en liaj zorgoj ĉiam super tiuj de l'laborista organizado, kiu ne ŝajnis al li konduki mem al la Revolucio.

## Ekziloj post ekziloj.

Post unujara malliberiĝo en 1878 li estis malkondamnata; li komencis panakiri de tiam per la laboro de siaj manoj, kiel elektristo. Ekzile li vivas, unue en Aleksandrio, tiam en Bajrut; el ambaŭ urboj li estas forpelata; li evitas esti liverata al la itala polico de sur la ŝipo, kiu albordiĝas Livornon. En Ĝenevo li estas en la momento, kiam Kropotkin fondas la "Ribelo"n. Post kelkatempa restado en Rumanio li venas en Parizon, laboras tie kiel meĥanikisto kaj vidas la Komunumanojn revenantajn el Nova

Kaledonio; forpelita en marto 1880, li iras al Londono kaj Berlino, poste oni retrovas lin en Parizo, kie li estas 4 monatojn en karcero. Same oni arestas lin en Svisio. Fine nur Londono restas lia rifuĝejo, kie li fiksiĝas dum du jaroj, ĝis 1883. Reveninte Italion, li kontraŭbatalas la porparlamentan tendencon de l'internaciistoj. Estante provizore libera, li publikigas semajnan gazeton "La Socia Demando" (1883/84). De tiu epoko datiĝas lia fama dialogo "Inter kamparanoj", modela elementa propagandbroŝuro.

Kondamnita, Malatesta sukcesas forkuri, kvankam lia domo estis ĉirkaŭita de policanoj. Li restas en Suda Ameriko ĝis 1889, poste (1889/90) en Nico kaj Londono, kie li publikigas kelkajn n-rojn de "Asocio" kun gvidideo por interkonsentemo de ĉiuj anarkitendencanoj.

## Inter Londono kaj Italio.

En januaro 1891 Malatesta partoprenis ĉe la fondkongreso de l'anarkista soci-revoluciula partio en Italio, kies programo entenis la komunan organizadon de l'produktado kaj konsumado per libere interkonsentitaj kontraktoj inter laboristoj organizitaj kaj la libera federacio de iliaj asocioj. La revolucia socialismo de Cipriani ligiĝis tie kun la anarkia komunismo de Malatesta.

Ankaŭ la anarkistoj de l'tendenco de Malatesta provis rilati kun la laboristaj organizoj. En Genovo (en 1892) laborista kongreso, kie la anarkistoj estis la plimulto, fondis kontraŭpolitikan lab. partion. La agado de Malatesta plilarĝiĝis tra la tuta duoninsulo.

En la lasta jardeko de l'deknaŭa jarcento, la plej vigla epoko de l'anarkismo en Eŭropo, Malatesta vojaĝis ofte eksterlanden : lia impeta agado aperis kiel protesto de l'revolucia spirito kontraŭ la laŭgrada enmarĉiĝo en la parlamentismo kaj adaptiĝo de l'socialistaj partioj al la burĝa socio. Laŭ li "ne la ideoj elvokas la agojn, sed la agoj naskas la ideojn." Per publikigo de nova ĵurnalo "Agitado" (1897/98) en Ankono li entreprenis novan paŝon por laborista organizado, en momento, kiam ĉiu libera penso estis subpremata en Italio. Malatesta estis arestata en januaro 1898, okaze de malsatribeloj, kaj akuzata pro konsistigo de "bandita asocio". Antaŭ la fortegaj protestoj de l'publiko kaj elokventa defendo de

Petro Gori la juĝistoj ne riskis teni la kulpigon kaj kondamnis lin nur je kelkmonata puno. Lia ĵurnalo pluaperis, dank'al kelkaj junaj oferemuloj de li influitaj. Intertempe okazis la ribeloj de Milano, kiuj sange estiĝ subpremataj de la registaro. Malatesta post sia liberigo estis deportata en insulon, de kie li sukcesis forkuri kaj reatingi Londonon.

Tie li restis ĝis 1913, ĉiam atentante pri la internacia movado. Tiam li revenas Italion kaj publikigas la "Volo"n. Ĉiu el liaj titoloj estas programo; ĉi-foje temas kontraŭbatali la reformismon kaj la pasivecon. En junio 1914 komenciĝas revoluciaj movadoj en Meza Italio, kiujn subtenas lia organo.

La lasta reveno Italion.

Ĉe militkomenco Malatesta troviĝas en Londono. Li tre klarvidas pri la situacio kaj ne hezitas diri tre nete, kion li pensas pri erar-irantaj amikoj, kiel Kropotkin kaj Ĉerkesof, al kiuj rasaj simpatioj kaj antipatioj perdigis la prudenton. En 1916 li respondas per broŝuro titolita "Registaraj anarkistoj" al la "Manifesto de l'Dekseso" (Kropotkin, Grav, Malato, k.a.), kiuj volis daŭrigi la militon "ĝisfine".

Ĉe la italaj anarkistoj ne okazis tiaj erariĝoj, kaj postmilite revenante Italion Malatesta trovas siajn batalkamaradojn plifortigitaj. Li devas kaŝe reatingi Italion; triumfa estas la akcepto. Li publikigas en Milano ĉiutagan gazeton anarkistan : "La Nova Homaro". Li faras ĉion por prepari la revolucian movadon skribe kaj parole. Li konsilas, instigas, sed lia sinteno estas ĉiam tiu de kamarado, egalulo inter egalaj.

Post malvenko de l'proletaro italia oni arestas lin, poste reliberigas. Li provas daŭrigi la lukton. Sed baldaŭ ĉiu libera penso estas subpremata. Lia lasta periodaĵo estas la revuo "Penso kaj Volo". De tiam lia aktiveco estos pli multe penso ol ago. Sed eĉ la penso estas tro por la faŝista reakcio. Li devas silenti, rigore observata : du faŝistoj gardas ĉe lia pordo, du aliaj akompanas lin, kiam li eliras; oni ne povas paroli kun li, nek lin saluti, ne estante arestata kiel suspektinda. Izolita de l'cetera mondo, danĝera por siaj propraj amikoj, li ricevas leterojn, kiam plaĉas al la faŝistoj, kaj oni konfiskas ĉiujn publik-

aĵojn, kiuj povus informi lin pri la movado en eksterlando. Tamen lia eterna optimismo ne forlasas lin; li atendas la faligon de l'tirano, la neeviteblan revolucion.

Antaŭ ĉio : moralo.

Precipe lin karakterizis, same kiel aliajn anarkistojn (Reklü, Kropotkin ktp) funda boneco, plena abnegacio, modesto, kiu lin faris denature egalulo de l'plej malaltaj, lojalo, kiu abomenis rimedojn malsincerajn, eĉ kontraŭ senskrupulaj kontraŭuloj - tiu tuto el kvalitoj, per kiuj tiaj homoj atestas, ke socio sen leĝoj estas ebla, sed ke ĝi havas kiel kondiĉon la disvolvon de l' individua konscienco kaj de l'moralaj faktoroj.

Oni devas rekoni, ke la eduka agado de l'anarkistoj en la etika senco havas sian distingan lokon en la tuto de l'socialista movado kaj utilas speciale por kontraŭpezi la tendencojn de politikuloj, emaj al senskrupula polemiko, kaj teoriuloj hipnotitaj de l'ekonomiaj demandoj tiagrade, ke ili kredas pri eblo estigi per ekonomiaj transformoj moralan renoviĝon, eĉ se oni kutimigis la homojn mensogi, trompi, kalumnii sub preteksto de atingenda celo, kaj venenis la atmosferon tiom, ke oni kreis ĉie malfidon, malkonkordon kaj malpacon en la mezo de la laborista klaso mem.

Laŭ artikolo de J. Menil(Mesnil)
kompil-trad. Omar.

Noto de LJP-broŝurservo : Tiu ĉi artikolo estas represita el "Sennaciulo", n-ro 396, de 3.11.1932.

# A N A R K I O

# K A J

# O R G A N I Z O

Kelkaj enkondukaj vortoj:

Post sia malvenko kontraŭ la bolŝevistoj en Rusio kaj Ukrajnio , kelkaj el la tieaj anarkistoj rifuĝis eksterlanden, kie ili povis analizi la kaŭzojn de la fiasko.

I.a., Archinov kaj Maĥno opiniis, ke ili malvenkis ĉefe pro la manko de organizo inter la diversaj tendencoj de la liberecana movado fronte al la bolŝevista armeo.

Archinov,kiu en 1922 fondis grupon de ekzilitaj anarkistoj-komunistoj kaj poste ekpublikigis la gazeton "Dielo Truda" , aperigis en 1926 projekton por organizi "Ĝeneralan Unuiĝon de l'Anarkistaro".

Sed al multaj , i.a. al Volin , Maĥno..., tiu projekto aspektis tre danĝera , ĉar la konstruota organizo tro similis al politika partio, kiu nepre kondukus al aŭtoritateca sistemo.

Ankaŭ Malatesta , la fama itala anarkisto , per la ĉisekva teksto akre kritikis la projekton. Kvankam celantaj nun forgesitan aferon (°) , liaj argumentoj restas ĉiam validaj. Efektive, ne malofte,en la diversaj epokoj de l' anarkisma movado, aperis la tento imiti la aliajn politikajn tendencojn kaj , pro strebado al "efikeco", konstrui strukturitan organizon , en kiu discipline kunaktivus la diversspecaj liberecanoj.

La tradukinto.

(°) Archinov revenis al Rusio en 1930 , aliĝis al la kompartio, sed estis tamen likvidita okaze de Stalina elpurigado.

# ANARKIO KAJ ORGANIZO

Franclingva libreto kun titolo "Interkonsenta bazo por organizo de l' Ĝenerala Unuiĝo de l'Anarkistaro" hazarde troviĝas en miaj manoj.(Oni ja scias, ke hodiaŭ en Italio ne cirkulas la nefaŝismaj skribaĵoj).

Publikigita nome de "Grupo de rusaj anarkistoj en eksterlando", ĝi estas projekto de anarkia organizo kaj ŝajne estas adresita pli speciale al la rusaj kamaradoj. Sed ĝi pritraktas demandojn, kiuj interesas ĉiujn anarkistojn kaj krome evidentas, ke ĝi klopodas akiri la konsenton de ĉiulandaj kamaradoj , pro tio mem ke ĝi estas franclingve verkita. Ĉiukaze , utilas ekzameni, por la Rusoj kiel por ĉiuj , ĉu la proponita Projekto harmonias kun la anarkismaj principoj kaj ĉu ĝia efektiviĝo vere servus la anarkisman celon. La motivoj de l' proponantoj estas bonegaj. Ili bedaŭras,ke la anarkistoj havis kaj havas al la socipolitikaj eventoj influon ne kompareblan kun la teoria kaj praktika valoro de ilia doktrino,nek kun ilia nombro,ilia kuraĝo,ilia sinoferemo, kaj ili opinias, ke la ĉefa kialo de tiu relativa malsukceso estas la manko de vasta,serioza, efektiva organizo.

Ĝis tie principe mi konsentus.

La organizo estas nur la praktikado de kunlaboro kaj solidaro , ĝi estas la natura , necesa kondiĉo de l'socia vivo, ĝi estas neevitebla fakto , kiu al ĉiuj sin trudas, tiel en la homsocio ĝenerale,kiel en ĉiu grupo de samcelanoj.

La homo nek volas nek povas vivi izolita, li eĉ ne povas vere fariĝi homo kaj kontentigi siajn materiajn kaj moralajn bezonojn alie ol en socio, kaj kun la kunlaboro de siaj samuloj. Estas fatale, do, ke ĉiuj, kiuj ne organiziĝas libere, ĉu ĉar ili ne povas ĝin fari, ĉu ĉar ili ne sentas ĝian urĝan necesón, tiuj nepre suferas la organizon starigitan fare de aliuloj, kiuj kutime konsistigas klason aŭ gvidantajn grupojn, kun la celo propraprofite ekspluati alies laboron.

Kaj la jarmila subpremado de l'popolo far' eta nombro da privilegiitoj, ĉiam estis la konsekvenco de la nekapableco de l'plimultaj individuoj akordiĝi kaj sin organizi surbaze de l'interes- kaj sentkomuneco kun la aliaj laboristoj por produkti, ĝui kaj eventuale sin defendi kontraŭ la ekspluatantoj kaj la subpremantoj. La anarkismo alportas rimedon al tiu situacio per sia fundamenta principo de libera organizo, kreita kaj vivigata de la libera volo de l'asocianoj, sen ia ajn aŭtoritateco, t.e. sen la rajto por iu individuo trudi al aliuloj la propran volon. Estas do normale, ke la anarkistoj klopodas apliki al sia privata vivo kaj al la vivo de sia movado tiun saman principon, sur kiu, iliaopinie, devus stariĝi ĉiu homsocio.

Iuj polemikoj lasus supozi, ke ekzistas anarkistoj kontraŭantaj ĉian organizon; sed, efektive, la multaj, tro multaj diskutoj, kiujn ni havis pri tiu temo – eĉ kiam ili estas malklarigitaj pro vortkvereloj aŭ akrigitaj pro personaferoj – koncernas ja la formon de l'organizo kaj ne ties principon. Tiel, kamaradoj, kiuj parole plej kontraŭas la organizon, organizas sin kiel la aliaj kaj eĉ pli bone ol la aliaj, kiam ili serioze volas fari ion. La demando, mi ripetas, situas tute en la aplikado.

Mi devus do konsideri kun simpatio la iniciaton de tiuj rusaj kamaradoj, tial ĉar mi estas konvinkita, ke organizo pli ĝenerala, pli bone strukturita, pli konstanta, ol tiuj kiujn ĝis nun realigis la anarkistoj – eĉ se ĝi ne sukcesus forigi ĉiujn erarojn, ĉiujn mankojn, eble neeviteblajn en movado kiu, kiel la nia, pioniras, kaj tial baraktas kontraŭ la nekompreno, la indiferento kaj ofte la malfavoro de l'plimulto – tia organizo nedubeble estus almenaŭ grava helpilo, potenca rimedo por diskonigi sukcese niajn ideojn.

Miaopinie,ĉefe necesas kaj urĝas, ke la anarkistoj sin organizu por influi la vojon , kiun sekvas la popolamasoj en sia lukto por plibonigoj kaj la emancipiĝo. Hodiaŭ ,la plej granda forto por socia transformo estas la laborista (sindikata) movado kaj de ties orientado plejparte dependas la aspekto de la okazontaj eventoj kaj la celo atingota de la venonta revolucio. Per siaj organizoj, fonditaj por defendi iliajn interesojn,la laboristoj ekkonscias pri la premado kiu subjugigas ilin kaj pri la antagonismo kiu disigas ilin de la mastroj,ili ekaspiras al pli bona vivo, ili kutimiĝas al kolektiva luktado kaj al solidaro kaj ili povas sukcese konkeri ĉiujn plibonigojn akordigeblajn kun la ŝtatisma kaj kapitalisma reĝimo. Poste,okazas aŭ la revolucio aŭ la reakcio.

La anarkistoj devas agnoski la utilecon kaj la gravecon de l' sindikata movado. Ili devas favori ties disvolviĝon kaj fari el ĝi unu el la leviloj de sia agado , strebante rezultigi el la kunlaborado de l'sindikatismo kun la aliaj progresemaj fortoj, socian revolucion , kiu konduku al la malapero de l'klasoj, al plena libero, egaleco, paco kaj solidaro inter ĉiuj homoj.Sed estus pereiga iluzio kredi, kiel multaj , ke la laborista movado per si mem , dank'al sia naturo mem , atingos tian revolucion . Tute male : en ĉiuj movadoj fonditaj surbaze de tujaj materiaj interesoj (kaj neeblas starigi vastan laboristan movadon sur aliaj bazoj),necesas la fermento, la puŝo, la kunaranĝita agado de la ideuloj, kiuj batalas kaj sin oferas cele al atingota idealo. Sen tiu levilo , ĉiu movado fatale tendencas adaptiĝi al la cirkonstancoj, ĝi naskas la konservativismon, la timon pro ŝanĝiĝo, ĉe kiuj sukcesas akiri pli bonajn vivkondiĉojn. Ofte kreiĝas novaj privilegiitaj klasoj, kiuj strebas eltenigi, firmigi la sistemon, kiun oni volus faligi.

Tial urĝe necesas esence anarkistaj organizoj , kiuj tiel interne kiel ekstere de l'sindikatoj luktas por plene efektivigi la anarkismon kaj strebas steriligi ĉiujn ĝermojn de korupto kaj reakcio.

Sed evidentas, ke por atingi tiun celon, la anarkistaj organizoj devas, en sia strukturo kaj sia funkciado, harmonii kun la principoj de anarkio . Do nepre necesas , ke ili estu neniel penetritaj de aŭtoritateco , ke ili sciu

akordigi la liberan individuan agadon kun la neceso kaj la plezuro de l' kunlaboro , ke ili utilu por disvolvi la konscion kaj la iniciatemon de siaj membroj kaj estu edukilo en la medio kie ili aktivas, kaj morala kaj praktika preparado al la dezirata estonteco.

Ĉu la koncerna Projekto respondas tiujn postulojn ? Mi kredas , ke ne . Laŭ mi , anstataŭ naski ĉe la anarkistoj pli grandan deziron por sin organizi , ĝi ŝajnas farita por firmigi la antaŭjuĝon de multaj kamaradoj , kiuj opinias, ke sin organizi estas submetiĝi al ĉefoj , aliĝi al aŭtoritateca , centralizema organismo, sufokanta ĉiun liberan iniciativon. Fakte, en tiu statuto estas esprimitaj ĝuste la proponoj, kiujn kelkiuj, kontraŭ la evidento kaj malgraŭ niaj protestoj, obstinas atribui al ĉiuj t.n. organizemaj anarkistoj.

o o
o

Ni ekzamenu:

Unue , ŝajnas al mi falsa (aŭ almenaŭ nerealigebla) la ideo kunigi ĉiujn anarkistojn en unu "Ĝeneralan Unuiĝon", t.e., kiel precizigas la Projekto, en unununuran revolucian kolektivon aktivan.

Ni anarkistoj povas diri, ke ni apartenas al sama partio, se, per la vorto "partio" oni celas la tuton de ĉiuj, kiuj troviĝas samflanke, kiuj havas la samajn ĝeneralajn aspirojn,kiuj, iel aŭ aliel,luktas por la sama celo kontraŭ komunaj kontraŭantoj kaj malamikoj. Sed tio ne signifas, ke eblas - kaj eble ne estas dezirinde - kunigi nin ĉiujn en saman difinitan asocion.

Tro diferencas la medioj kaj la luktokondiĉoj,tro multas la eblaj agadmanieroj , kiuj dispartigas inter si ies kaj alies preferojn,kaj tro multas ankaŭ la diferencoj inter la temperamentoj kaj la interpersonaj neakordigebloj, por ke Ĝenerala Unuiĝo, serioze realigita, ne fariĝu obstaklo kontraŭ la individuaj aktivecoj,kaj eble eĉ kaŭzo de la plej akraj internaj kvereloj, pli ol rimedo por kunordigi kaj sumigi ĉies fortostreĉojn.

Ekzemple, kiel organizi sammaniere kaj kun la sama anaro , publikan asocion por la propagando kaj la agitado meze de l'popolamasoj, kaj sekretan societon , devigatan,

pro la politikaj cirkonstancoj en kiuj ĝi agadas, kaŝi al la malamiko siajn celojn, siajn rimedojn, siajn agentojn? Kiel sama taktiko povus esti adoptita tiel de la edukismanoj - persvaditaj ke sufiĉas la propagando kaj la ekzemplo de kelkiuj por progresive transformi la individuojn kaj sekve la socion - kiel de la revoluciuloj konvinkitaj pri la neceso perforte faligi sistemon , kiu subtenas sin nur per la perforto , kaj krei, kontraŭ la perforto de l' subpremantoj, la kondiĉojn necesajn al la libera praktikado de l'propagando kaj al la praktika aplikado de la idealaj konkeroj? Kaj kiel konservi unuigitaj la homojn,kiuj pro apartaj kialoj nek ŝatas nek estimas unu la alian,kaj tamen povas egale esti bonaj kaj utilaj batalantoj por anarkismo ?

Aliparte, la aŭtoroj de l'Projekto deklaras absurda la ideon krei organizon kunigantan la reprezentantojn de l' diversaj anarkismaj tendencoj. Tia organizo, ili asertas, "enkorpigante teorie kaj praktike heterogenajn elementojn, estus nur meĥanika kunmetaĵo el individuoj,kiuj havas malsaman koncepton pri ĉiuj demandoj koncernantaj la anarkisman movadon; ĝi nepre diseriĝus tuj kiam ekelprovita de l'faktoj kaj de l'reala vivo".

Tre bone.Sed,se ili agnoskas la ekziston de la alitendencaj anarkistoj,ili devos lasi al ili la rajton sin organizi siaflanke kaj labori por l'anarkio laŭ sia preferata maniero. Aŭ,ĉu ili pretendas ekskludi el la anarkismo, ekskomuniki ĉiujn, kiuj ne akceptas ilian programon?

Ili asertas,ke ili bonvolas akcepti en unusola organizo ĉiujn sanajn elementojn de la liberecana movado, kaj,nature,ili emos juĝi sanaj nur tiujn, kiuj samopinias kiel ili. Sed kion ili faros pri la malsanaj elementoj?

Certe , inter tiuj, kiuj sin nomas anarkistoj, samkiel en ĉiu homa kolektivo , troviĝas diversvaloraj elementoj, kaj eĉ iuj , kiuj nome de anarkismo cirkuligas ideojn en tre duba afineco kun ĝi. Sed kiel eviti tion? La anarkisma vero ne povas nek devas dependi de la decidoj de realaj aŭ fiktivaj plimultoj. Nur necesas- kaj sufiĉus - ke ĉiuj havu kaj uzu la plej larĝan rajton de libera kritiko kaj ke ĉiu povu defendi la proprajn ideojn kaj elekti la proprajn kunulojn. Lastinstance, la faktoj juĝos kaj montros la pravanton.

Ni do forlasu la ideon arigi ĉiujn anarkistojn en unusolan organizon . Ni konsideru tiun "Ĝeneralan Unuiĝon", al ni proponitan de la rusaj kamaradoj, kiel tion, kio ĝi estus en realo: la unuiĝo de ia nombro da anarkistoj, kaj ni ekzamenu, ĉu la proponita organizformo konformas al la anarkismaj principoj kaj metodoj kaj ĉu ĝi povas helpi al la triumfo de anarkismo. Ankoraŭfoje, ŝajnas ke ne. Mi ne pridubas la sinceran anarkismon de tiuj rusaj kamaradoj ; ili volas realigi la anarkisman komunismon kaj serĉas la manieron por atingi tion kiel eble plej rapide . Sed ne sufiĉas deziri ion,ankaŭ endas uzi la oportunajn rimedojn por akiri ĝin, same kiel por iri al iu loko, endas uzi la vojon kondukantan al tiu loko, se ne oni trafus alian.Nu, ĉar tiu proponita organizo estas el aŭtoritateca speco,ĝi ne nur ne favorus la triumfon de la anarkisma komunismo, sed ĝi falsus la anarkisman spiriton kaj havus rezultojn kontraŭajn al tiuj atendataj de la organizantoj.

Efektive , tiu "Ĝenerala Unuiĝo" konsistus el tiom da partaj organizoj, kiom estus da sekretariejoj por ideologie gvidi ĝian teknikan kaj politikan agadon , kaj estus unu plenum-komitato de l' Unuiĝo por plenumi la decidojn faritajn de l'Unuiĝo, kaj por "gvidi la ideologion kaj la grup-organizon konforme al la ideologio kaj al ĝenerala taktik-linio de l'Unuiĝo".

Ĉu tio ĉi estas anarkisma? Laŭ mi, tio estas registaro kaj eklezio. Mankas, estas vere, la polico kaj la bajonetoj,samkiel mankas la fideluloj favore akceptontaj la desupre diktitan ideologion, sed tio simple signifas,ke tiu registaro estus senpova kaj nevivpova, kaj ke tiu eklezio estus vartejo por skismoj kaj herezoj. La spirito,la tendenco estas aŭtoritatecaj kaj la eduka efiko estus ĉiam antianarkisma.

Sed prefere aŭskultu: "La plenum-organo de la ĝenerala liberecana movado - la anarkisma unuiĝo- adoptas la principon de kolektiva respondeco; la tuta Unuiĝo respondecos pri la politika kaj revolucia aktiveco de l'Unuiĝo".

Kaj post tiu absoluta negado de ĉiu individua sendependeco, de ĉiu agad- kaj iniciativ-libero,la iniciatintoj - memorante ke ili estas anarkistoj- sin deklaras federacistoj kaj tondras kontraŭ la centralizado, kiu,ili diras,

neeviteble rezultigas la servutiĝon kaj la meĥanikiĝon de la vivo de l'socio kaj de l'partioj.

Sed se la Unuiĝo respondecas pri tio farata de ĉiu el ĝiaj membroj,kiel lasi al ĉiu aparta ano kaj al la diversaj grupoj la liberon apliki la komunan programon laŭ la maniero,kiun ili kredas la plej bona? Kiel respondeci pri faro, kiun oni ne havas la eblecon malhelpi?Do la Unuiĝo, kaj ĝianome la plenum-komitato,devus kontroli la agadon de ĉiuj apartaj membroj kaj fiksi al ili kion ili faru, kaj, ĉar la malaprobo al plenumita fakto ne malpliigas respondecon anticipe definitive akceptitan, neniu povus fari ion ajn,antaŭ ol ricevi la aprobon,la permeson de l'Komitato. Kaj aliflanke,ĉu individuo povas preni sur sin la respondecon pri la agadoj de kolektivo antaŭ ol scii kion ĝi faros, kaj kiel li povas malhelpi al ĝi fari kion li malaprobas ?

Krome, la aŭtoroj de l'Projekto diras,ke estas la Unuiĝo,kiu volas kaj decidas. Sed kiam oni diras "volo de l' Unuiĝo", ĉu oni celas diri "volo de ĉiuj ĝiaj membroj" ? Ĉi-kaze, por ke la Unuiĝo povu agi, necesus, ke ĉiuj ĝiaj membroj,pri ĉiuj demandoj,ĉiam havu ekzakte la saman opinion. Nu,estas nature,ke ĉiuj interkonsentas pri la ĝeneralaj kaj bazaj principoj, se ne ili ne estus unuiĝintaj, sed oni ne povas kredi,ke pensantaj estuloj estos ĉiuj kaj ĉiam samopiniaj pri tio farota en ĉiuj cirkonstancoj kaj pri la elekto de la personoj , al kiuj konfidi la ŝarĝon gvidi kaj plenumi.

Efektive , laŭ tio rezultanta el la teksto mem de l' Projekto , per "volo de l'Unuiĝo" oni povas aludi nur la volon esprimitan de kongresoj, kiuj elektas kaj kontrolas la plenum-komitaton kaj decidas pri ĉiuj gravaj demandoj. Nature,la Kongresoj konsistus el reprezentantoj elektitaj je la plimulto en ĉiu aliĝinta grupo kaj tiuj delegitoj decidus pri tio farota , ĉiam je la voĉ-plimulto . Do, en la plej bona hipotezo , la decidojn alprenus plimulto el plimulto, kio ja povus reprezenti - aparte kiam estus pli ol du malsamaj opinioj - nur malplimulto.

Fakte rimarkendas , ke en la kondiĉoj kie vivas kaj luktas la anarkistoj , iliaj kongresoj estas ankoraŭ malpli reprezentivaj,ol la burĝaj Parlamentoj, kaj ilia kon-

trolo al la plenum-organoj , se ĉi-lastaj havas aŭtoritatan povon , malofte okazas ĝustatempe kaj efike . Al la anarkistaj kongresoj praktike iras kiu volas kaj kiu povas, kiu havas aŭ trovas la necesan monon kaj ne estas malhelpata de policaĵoj . Tie oni renkontas tiom da homoj kiuj reprezentas nur sin mem aŭ etan nombron da amikoj , kiom da tiuj reale portantaj la opiniojn kaj dezirojn de multnombra kolektivo . Kaj , krom la singardo kontraŭ la perfiduloj kaj la spionoj - kaj ankaŭ pro tiu necesa singardo mem - serioza kontrolado de l' mandatoj kaj de ties valoro estas neebla.

Ĉiamaniere, ni troviĝas tutmeze de majoritat-sistemo, tutmeze de parlamentismo . Oni scias, ke la anarkistoj ne agnoskas la regadon de plimulto (demokratio), nek akceptas la regadon de eta nombro (aristokratio, oligarkio, aŭ diktaturo de klaso aŭ partio , nek la regadon de unusola (aŭtokratio, monarkio, aŭ persona diktaturo).

Milfoje la anarkistoj kritikadis la t. n. majoritat-regadon , kiu, en la praktika aplikado , ĉiam kondukas al la superregado de eta malplimulto . Ĉu endos refari ĝin ankoraŭfoje por niaj rusaj kamaradoj ?

Certe, la anarkistoj agnoskas, ke en la komunuma vivo ofte necesas, ke la malplimulto konformiĝu al la vidpunkto de la plimulto . Kiam estas necese , aŭ evidente utile ion fari, kaj ke por tion fari ĉies kunlaboro estas bezonata , la malplimultanoj devas senti la neceson sin adapti al la volo de l'plimulto. Cetere, ĝenerale, por kune vivi en paco kaj en reĝimo de egaleco , necesas, ke ĉiuj estu akordiĝemaj , toleremaj , fleksеblaj . Sed tiu adaptiĝo de parto de l'asocianaro al la alia parto devas esti reciproka, memvola, fonti el tiu ĉies konscio, ke neniu paralizu la socian vivon per sia obstino . Ĝi ne estu trudita kiel principo kaj statuta regulo . Ĝi estas idealo , kiun eble estos malfacile tute realigi en la praktiko de la socia vivo ĝenerala, sed estas certe, ke ĉiu homa grupiĝo estas des pli proksima al anarkio, ju pli la akordo inter minoritato kaj majoritato estas libera, spontana kaj trudita nur de la naturo de l'faktoj.

Do , se la anarkistoj ne rekonas al la majoritato la rajton regi en la ĝenerala homsocio, kie la individuo ta-

men estas devigata akcepti iujn limigojn, ĉar li ne povas izoliĝi sen forlasi la kondiĉojn de la homa vivo , se ili volas, ke ĉio fariĝu per libera interkonsento inter ĉiuj, kiel eblus, ke ili adoptu la programon de l'majoritato en siaj esence libervolaj asocioj kaj ke ili komence deklaru, ke ili submetiĝos al la decidoj de l'plimulto,eĉ antaŭ ol scii kio ili estos?

Ke la anarkio, la libera organizado sen superregado de majoritato super minoritato, kaj inverse, estas kvalifikita fare de la ne-anarkistoj kiel utopio nerealigebla, aŭ realigebla nur en tre fora estonteco , tio estas komprenebla . Sed estas neimageble , ke tiuj , kiuj deklaras sin anarkistoj kaj volus realigi la anarkion - aŭ almenaŭ serioze proksimiĝi al ĝi hodiaŭ prefere ol morgaŭ- ke ĝuste tiuj forneas la fundamentajn principojn de l'anarkismo,en la organizo mem per kiu ili proponas al si batali por ĝia triumfo!

o o
o

Laŭ mi, anarkista organizo devas stari sur bazoj tre diferencaj de tiuj proponitaj far tiuj rusaj kamaradoj,

Plena aŭtonomeco, plena sendependeco kaj, sekve ,plena respondeco de la individuoj kaj de l' grupoj ; libera interkonsento inter tiuj , kiuj opinias utile sin unuigi por kunlabori al komuna tasko , morala devo respekti la faritajn promesojn kaj fari nenion en kontraŭo kun la akceptita programo . Sur tiuj bazoj , adoptiĝas la praktikaj formoj , la taŭgaj rimedoj por doni realan vivon al la organizo : grupoj, federacioj, kunvenoj, kongresoj, komitatoj zorgantaj pri la korespondado kaj la aliaj taskoj. Sed ĉio ĉi fariĝu libere, tiel ke la individuaj penso kaj iniciatemo ne estu malhelpataj, kaj nur por doni pli da efiko al strebadoj, kiuj , se izolitaj , estus neeblaj aŭ preskaŭ senefikaj.

Tiel , en la Kongresoj de anarkista organizo , kvankam ili suferas ĉiujn de ni priskribitajn mankojn proprajn al reprezentaj organoj , forestas ĉia aŭtoritatismo, ĉar ili ne leĝofaras , nek trudas al aliaj siajn proprajn decidojn . La kongresoj utilas por konservi kaj disvolvi la personajn rilatojn inter la plej aktivaj kamaradoj , por resumi kaj decidi la studadon de programoj pri la ag-ri-

medoj kaj -vojoj , diskonigi al ĉiuj la situacion en la diversaj regionoj kaj la plej urĝan agadon farotan en ĉiu el ili , por formuli la diversajn opiniojn cirkulantajn inter la anarkistoj kaj fari el tio ian statistikon. Kaj la kongresaj decidoj ne estas devigaj reguloj, sed sugestoj, konsiloj, proponoj prezentotaj al ĉiuj interesatoj ; ili fariĝas devigaj kaj plenumendaj nur al tiuj, kiuj akceptas ilin kaj nur en la parto, kiun ili akceptas . La administraj organoj, kiujn ili elektas - Koresponda komisiono ktp - havas nenian gvid-povon , iniciatas nur por tiuj , kiuj petas kaj aprobas tiujn iniciatojn, havas nenian aŭtoritatecon por trudi la proprajn vidpunktojn,kiujn ili kiel grupoj de kamaradoj certe povas defendi kaj disvastigi , sed kiujn ili ne povas prezenti kiel la oficialan opinion de la organizo. Ili publikigas la kongresrezoluciojn , la opiniojn kaj proponojn komunikitajn de grupoj kaj individuoj, ili utilas al tiuj, kiuj volas uzi ilin por pli facilaj rilatoj inter la grupoj kaj por la kunlaboro inter tiuj , kiuj interkonsentas pri diversaj iniciatoj , sed ĉiu liberas rekte korespondi kun kiu ajn aŭ uzi aliajn komitatojn elektitajn de apartaj grupiĝoj . En anarkista organizo ĉiu membro povas deklari ĉiujn opiniojn kaj uzi ĉiujn taktikojn, kiuj ne kontraŭas la akceptitajn principojn kaj ne malutilas al alies aktiveco.Ĉiukaze, difinita organizo daŭras tiom longe kiom la unuigaj motivoj superas la disigajn; en la mala kazo, ĝi dissolviĝas kaj lasas lokon al aliaj, pli homogenaj grupiĝoj.

Certe,la daŭro,la konstanteco de organizo estas sukceskondiĉo en nia longa luktado kaj,aliflanke, estas nature, ke ĉiu institucio , instinkte, aspiras senfine daŭri. Sed la daŭro de liberecana organizo devas esti la konsekvenco de la spirita afineco inter ĝiaj membroj kaj de la eblecoj de ĝia strukturo adaptiĝi al la cirkonstanc-ŝanĝoj ; kiam ĝi ne plu kapablas utilan taskon, estas preferinde, ke ĝi mortu.

Eble tiuj rusaj kamaradoj opinios, ke organizo tia,kia mi imagas ĝin, kaj kia ĝi estis pli malpli bone realigita en diversaj epokoj , estas malmulte efika . Mi komprenas tion. Tiuj kamaradoj estas obsedataj pro la sukceso de l' bolŝevistoj en sia lando; ili volus, laŭ la maniero de l' bolŝevistoj,kunigi la anarkistojn en iaspecan, disciplin-

itan armeon,kiu, sub la ideologia kaj praktika gvidado de kelkaj ĉefoj , kompakte marŝu sturme kontraŭ la aktualajn reĝimojn kaj, kiu , kiam akirita la materia venko , gvidu la konstruadon de la nova socio . Kaj eble veras , ke per tiu sistemo - kondiĉe ke oni supozu ke la anarkistoj kunlaboros kaj ke la ĉefoj estos geniuloj - nia materia forto kreskus. Sed por kiaj rezultoj?Ĉu la anarkismo ne fariĝus kio fariĝis la socialismo kaj la komunismo en Rusio? Tiuj kamaradoj senpacience deziras la sukceson- kaj ankaŭ ni, sed ne endas, por vivi kaj venki, forlasi la vivkialojn kaj kripligi la karakteron de l' eventuala venko . Ni volas batali kaj venki, sed kiel anarkistoj kaj por l'anarkio.

Eriko Malatesta

(1927)

--==o==--

El la deklaro de E. Malatesta pri "Anarkio kaj organizo", okaze de la internacia anarkista kongreso,en Amsterdamo , aŭgusto 1907:

....

Kio liberigas la individuon, kio ebligas al li disvolvi ĉiujn siajn kapablojn, tio estas ne la izoliĝo sed la asociiĝo.

Por plenumi vere utilan laboron , la kunlaborado estas necesega, hodiaŭ pli ol iam. Sendube, la asocio devas lasi plenan aŭtonomecon al la aliĝintaj individuoj , kaj la federacio devas respekti en la grupoj tiun aŭtonomecon: ni gardu nin kontraŭ la kredo , ke la organiz-manko estas garantio de libero. Ĉio pruvas, ke la realo estas alia.

Ekzemple: ekzistas francaj anarkistaj gazetoj , kiuj

fermas siajn kolonojn al ĉiuj , kies ideoj, kies stilo aŭ pli simple kies persono bedaŭrinde malplaĉis al la kutimaj redaktoroj. Rezulte, tiuj redaktoroj disponas personan povon, kiu limigas la opini- kaj esprim-liberon de l' kamaradoj. La situacio estus alia, se tiuj gazetoj,anstataŭ esti la persona propraĵo de tiu aŭ tiu ĉi individuo,apartenus al grupiĝoj : tiam ĉiuj opinioj povus en ili libere konfrontiĝi.

Oni multe parolas pri aŭtoritato, aŭtoritatismo . Sed pri tio necesus sin interkompreni . Kontraŭ la aŭtoritato enkorpiĝinta en la Ŝtato kaj havanta la nuran celon pludaŭrigi la ekonomian sklavecon interne de l' socio , ni firme ekstaras kaj ne ĉesos ribeli . Sed ekzistas tiu pure morala aŭtoritato fontanta el la spertado , la inteligento aŭ la talento , kaj kvankam ni estas anarkistoj , neniu el ni malrespektas tiuspecan aŭtoritaton.

Estas malpravo, prezenti al si la "organizemulojn" ,la federaciistojn , aŭtoritataj ; kaj ankaŭ malpravo ne malpli grava, imagi la "antiorganizemulojn" senhezite kondamnantaj sin al izoliĝo. Laŭ mi , mi ripetas , la kverelo inter la individuistoj kaj la organizemuloj estas nura vort-kverelo, nepravigebla ĉe atenta ekzameno de l' faktoj. En la praktika realo,kion do ni vidas? Ke la "individuistoj" iufoje estas pli bone organizitaj ol la "organizemuloj" , pro tio ke ĉi-lastaj tro ofte nur predikas la organizadon sen ĝin praktiki. Aliparte, okazas, ke oni trovas multe pli da efektiva aŭtoritatismo en la grupiĝoj, kiuj brue sin proklamas por la "absoluta individua libero" ol en tiuj, kiujn kutime oni konsideras aŭtoritataj , pro tio ke ili havas sekretariojn kaj alprenas decidojn.

Alidirite , organizemuloj aŭ antiorganizemuloj , ĉiuj organiziĝas. Nur tiuj,kiuj nenion aŭ malmulton faras, povas vivi en izoleco kaj plenĝui ĝin. Jen la vero: kial ne konfesi ĝin ?

....

--==o==--

El "L'Anarkio" (1891) :

## LA SIGNIFO DE L' AŬTORITATO

....

Ni ĉiam staras antaŭ la antaŭjuĝo , ke registaro estas nova forto ., eliĝinta el oni ne scias kie, kiu per si mem aldonas ion al la sumo de l' fortoj kaj de l' kapabloj de kiuj konsistigas ĝin kaj de kiuj obeas ĝin.Male,ĉion faratan en la homaro faras la homoj , kaj la registaro kiel tia aldonas mem nur la tendencon ĉion monopoligi profite al iu parto aŭ iu klaso kaj rezisti ĉiun iniciaton naskiĝantan ekster ĝia intrigantaro.

Aboli la aŭtoritaton , aboli la registaron, ne signifas detrui la individuajn kaj kolektivajn fortojn , kiuj agas en la homaro, nek la influojn , kiujn la homoj havas unuj sur la aliajn , tio estus redukti la homaron al amaso da atomoj inertaj kaj malligitaj unuj de la aliaj, kio estas neebla , kaj kio, se ebla, estus la detruo de ĉiu socio , la morto de l'homaro.

Aboli la aŭtoritaton signifas aboli la monopolon de l' forto kaj de l'influo;aboli la aŭtoritaton signifas aboli tiun situacion,en kiu la socia forto,t.e. ĉies forto, estas la instrumento de la penso, de la volo, de la interesoj de eta nombro da individuoj, kiuj , per ĉies forto forigas , por sia avantaĝo kaj por tiu de siaj ideoj,ĉies liberon.

Aboli la aŭtoritaton signifas detrui formon de socia organizo , per kiu la estonteco restas de iu revolucio al alia, akaparita, profite al tiuj, kiuj estis la momentaj venkintoj.

.... --==o==--

# ANARKIO

## KAJ

## SINDIKATISMO

El la deklaro de E. Malatesta , rebate al la vidpunkto de Pierre Monatte , okaze de la internacia anarkista kongreso en Amsterdamo, aŭgusto 1907.

---

La konkludo, kiun atingis Monatte, estas, ke la sindikatismo estas necesa kaj sufiĉa rimedo por socia revolucio. Alivorte, Monatte deklaris, ke la <u>sindikatismo sufiĉas al si mem</u> . Kaj jen estas, laŭ mi, absolute falsa doktrino. Kontraŭbatali tiun doktrinon estos la temo de mia parolado.

La sindikatismo , aŭ pli ekzakte la laborista movado (la laborista movado estas de ĉiuj konata <u>fakto</u> , dum la sindikatismo estas doktrino, sistemo, kaj ni evitu konfuzi ilin), nu, la laborista movado ĉiam trovis en mi subtenanton fervoran, sed ne blindan. Tial, ĉar mi konsideris ĝin aparte favora tereno por nia revolucia propagando, samtempe kiel kontaktilo inter la popolamasoj kaj ni. Ne necesas, ke mi insistu ĉi-rilate.

....

Hodiaŭ kiel hieraŭ mi volas, ke la anarkistoj eniru en la laboristan movadon. Mi estas, kiel hieraŭ, sindikatisto, t.s. ke mi estas subtenanto de l'sindikatoj. Mi ne deziras anarkistajn sindikatojn , kiuj tuttuje pravigus la ekziston de sindikatoj socialdemokrataj, respublikanaj, rojalistaj aŭ aliaj , kaj povus roli nur kiel disigantoj de la laborista klaso kontraŭ ĝi mem. Eĉ t.n. <u>ruĝajn</u> sindikatojn mi ne volas , tial ke mi ne volas la t. n. <u>flavajn</u> .

Kontraŭe, mi volas sindikatojn larĝe malfermitajn al ĉiuj laboristoj sen opini-distingo, absolute neŭtralajn sindikatojn.

Mi estas do por la plejeble aktiva partopreno en la laborista movado . Sed mi tion poras precipe por la profito de nia propagando, kies agadkampo tiel estus ege plivastigita. Tamen tiu partopreno neniel povas signifi rezignon de niaj plej karaj ideoj. En la sindikato ni restu anarkistoj, laŭ la plena forto kaj amplekso de tiu vorto . Por mi, la laborista movado estas nur rimedo - kompreneble la plej bona el ĉiuj al ni disponeblaj rimedoj.Tiun rimedon mi rifuzas konsideri kiel celon , kaj mi eĉ forpuŝus ĝin, se ĝi forgesigus al ni nian anarkisman idearon , aŭ pli simple niajn aliajn propagand- kaj agit-rimedojn.

Male , la sindikatistoj emas fari el la rimedo celon , kaj konsideri parton la tuto. Kaj tiel , en la spirito de kelkaj el niaj kamaradoj, la sindikatismo estas fariĝanta nova doktrino kaj minacanta la anarkismon en ties ekzisto mem.

Nu,eĉ se ĝi plifortigas sin per la ja senutila epiteto "revolucia",la sindikatismo estas kaj ĉiam restos nur laŭleĝema kaj konservema , sen alia atingebla celo - kaj ne ĉiam! - ol la plibonigo de l'laborkondiĉoj.Kiel pruvon mi citos nur tion okazantan en la grandaj usonaj laboristaj unuiĝoj . Dum ili montriĝis radikale revoluciismaj , kiam ili estis ankoraŭ malfortaj , tiuj unuiĝoj poste tutklare fariĝis per siaj kresko kaj riĉiĝo , konservativaj organizoj, nur absorbe okupataj fari el siaj membroj privilegiulojn en l' uzino , la laborejo aŭ la minejo, kaj multe malpli malamikaj kontraŭ la mastra kapitalismo , ol kontraŭ la neorganizitaj laboristoj , kontraŭ tiu ĉifvesta proletaro vipita de la socialdemokratoj ! Sed tiun senĉese kreskantan , senlaboran proletaron - kiu ne estas atentinda de la sindikatismo, aŭ pli ĝuste, kiu estas atentinda nur kiel obstaklo - ni anarkistoj ne povas forgesi kaj ni devas defendi ĝin, ĉar ĝi estas tiu plej suferanta.

Mi ripetas: necesas, ke la anarkistoj iru en la laboristajn unuiĝojn . Unue por fari tie anarkisman propagandon, poste ĉar tio estas la sola rimedo por ke ni disponu je la taŭga momento grupojn kapablajn kapti la gvidadon

de la produktado ; fine ni devas tien iri por energie re-agi kontraŭ tiu aĉa spiritostato , kiu inklinigas la sin-dikatojn defendi nur apartajn interesojn.

La fundamenta eraro de Monatte kaj de ĉiuj revoluciaj sindikatistoj , laŭ mi , devenas de multe tro simplisma koncepto pri klasbatalo . La koncepto , laŭ kiu la ekonomiaj interesoj de ĉiuj laboristoj - de la laborista klaso - estus solidaraj , la koncepto laŭ kiu sufiĉas ke laboristoj ekdefendu siajn proprajn interesojn , por samtempe defendi la interesojn de la tuta proletaro kontraŭ la mastraro.

La realo estas, laŭ mi, tute alia. La laboristoj, kiel la burĝoj, kiel ĉiuj, suferas tiun universalan konkurenc-leĝon, kiu fontas el la privata proprieto kaj el la reĝimo , kaj kiu malaperos nur kun ĉi-lasta . Ne ekzistas do klasoj , laŭ la ĝusta senco de l' vorto, tial ke ne estas klas-interesoj . Interne de la laborista "klaso" mem ekzistas, same kiel ĉe la burĝaro, la konkurado kaj la luktado.La ekonomiaj interesoj de iu laborista kategorio estas neeviteble en kontraŭeco kun tiuj de alia kategorio . Kaj oni ofte vidas, ke ekonomie kaj morale iuj laboristoj estas multe pli proksimaj de la burĝaro ol de la proletaro (.....) Ne necesas , ke mi memorigu al vi , ke dum la strikoj , la laboristoj tre ofte uzas la perforton ... ĉu kontraŭ la polico kaj la mastroj ? Ho ne! Kontraŭ la krumir'oj (°) , kiuj tamen estas ekspluatataj samkiel ili kaj eĉ ankoraŭ pli malfavorataj , dum la veraj malamikoj de l'laboristo, la nuraj obstakloj kontraŭ la socia egaleco, estas la policanoj kaj la mastroj.

Tamen, inter la proletoj, eblas la morala solidaro, se ne la ekonomia. La laboristoj, kiuj limigas sin je la defendo de siaj korporaciaj interesoj, ne konos ĝin, sed ĝi naskiĝos ekde kiam komuna volo transformi la socion faros el ili novajn homojn . En la aktuala socio , la solidaro povas esti nur la rezulto de plena samopinieco en sama idealo. Nu , estas la rolo de l'anarkistoj veki la sindikatojn al la idealo , orientante ilin iom post iom al la

-----

(°)krumir': En Italio kaj Svisio tiel oni nomas la "flavulojn" t.e. tiujn, kiuj laboras dum striko.

socia revolucio - kun la risko malutili al tiuj "tujaj avantaĝoj" , por kiuj ili aspektas hodiaŭ tiel frandemaj.

Ke la sindikata agado estas danĝera , tion oni ne plu povas nei. La plej grava danĝero certe estas, kiam la aktivulo akceptas sindikatajn funkciojn , ĉefe kiam tiuj ĉi estas pagataj. Ĝenerala regulo : la anarkisto, kiu akceptas esti la konstanta kaj salajrata oficisto de sindikato, estas perdita por la anarkismo! De tiam li fariĝas la ŝuldanto de kiuj pagas lin, kaj,ĉar tiuj ne estas anarkistoj, la salajrata oficisto,de tiam lokita inter sia konscienco kaj sia intereso , aŭ sekvos sian konsciencon kaj perdos sian postenon, aŭ sekvos sian intereson kaj tiam , adiaŭ! la anarkismo!

En la laborista movado la funkciulo estas danĝero komparebla nur al la parlamentismo: unu kaj la alia kondukas al la korupto , kaj de la korupto ĝis la morto , ne estas malproksime!

o o
o

Kaj nun ni pritraktu la ĝeneralan strikon.

Persone, mi akceptas ties principon , kiun mi plejeble disvastigas de antaŭ jaroj.La ĝenerala striko ĉiam ŝajnis al mi bonega rimedo por komenci la socian revolucion. Tamen ni gardu nin kontraŭ la malutila iluzio, ke, per la ĝenerala striko , la armita ribelego fariĝas superfluaĵo.

Oni asertas , ke subite haltigante la produktadon , la laboristoj en kelkaj tagoj malsatigos la burĝaron , kiu, malsatmortante, estos ja devigata kapitulacii . Mi ne povas imagi pli grandan absurdaĵon . Dum ĝenerala striko la unuaj malsatmortantoj estus ne la burĝoj , kiuj disponas ĉiujn akumulitajn produktojn, sed la laboristoj, kiuj havas por vivi nur sian laboron.

La ĝenerala striko, kia oni ĝin anticipe priskribas al ni , estas nura utopio . Aŭ la laboristo , malsatmortante post tri tagoj da striko, revenos kapmalleve, kaj ni nombros plian malvenkon.Aŭ li volos perforte ekpreni la produktojn. Kiujn malhelpantojn li trovos antaŭ si ? Soldatojn, ĝendarmojn, se ne la burĝojn mem , kaj tiam neeviteble la demando devos solviĝi per fusiloj kaj bomboj. Jen estos la ribelego kaj venkos la pli forta.

Ni do prepariĝu al tiu neevitebla ribelego , anstataŭ limigi nin rekomendi la ĝeneralan strikon, kiel panaceon aplikeblan al ĉiuj malbonoj. Oni ne obĵetu, ke la registaro estas armegita kaj estos ĉiam pli forta ol la ribelantoj. En Barcelono,en 1902,la trupo ne estis multnombra. Sed oni ne estis preparita por la armita lukto,kaj la laboristoj , ne komprenante ke la politika regpovo estas la vera kontraŭbatalanto , sendadis delegitojn al la registaro por peti, ke ĝi cedigu la mastrojn.

Cetere, la ĝenerala striko, eĉ reduktita al kio ĝi reale estas, restas unu el tiuj ambaŭtranĉaj armiloj, kiujn oni uzu nur tre singarde. La nutraĵ-servo ne povas toleri tro longan interrompon.Endos do perforte kapti la provizrimedojn, kaj tion tuj,sen atendi, ke la striko evoluu en ribelegon.

Tial, pli ol instigi la laboristojn ĉesigi la laboron, estas ja preferinde instigi ilin daŭrigi ĝin por la propra profito. Se ne , la ĝenerala striko rapide transformiĝus en ĝeneralan malsategon,eĉ se oni estus sufiĉe energia por tuj de la komenco kapti ĉiujn produktojn akumulitajn en la magazenoj . Funde, la ideo pri ĝenerala striko fontas el tre erara kredo : la kredo, ke per la produktoj akumulitaj de la burĝaro la homaro povus konsumi , sen produkti, dum mi ne scias kiom da monatoj aŭ jaroj.(....) La aktuala situacio ne estas tiom riĉa kiom oni kredas. Kropotkin ie demonstris , ke en la kazo de subita halto de la produktado , Anglio disponus nutraĵojn por nur unu monato ; Londono por nur tri tagoj . Mi ja scias , ke ekzistas la bone konata fenomeno de superproduktado . Sed ĉia superproduktado trovas sian tujan mildigilon en la krizo , kiu baldaŭ reordigas la industrion. La superproduktado estas ĉiam nur provizora kaj relativa.

Nun necesas konkludi . Iam mi bedaŭris , ke la kamaradoj izolas sin for de la laborista movado . Hodiaŭ , mi bedaŭras, ke multaj inter ni , falante en la malan eksceson , lasas sin absorbi de tiu movado . Ankoraŭfoje , la laborista organizo , la striko , la ĝenerala striko , la rekta agado , la bojkotado , la sabotado kaj eĉ la armita ribelego, tio estas nur <u>rimedoj</u> . La anarkio estas la <u>celo</u>. La anarkisma revolucio, kiun ni celas, multe superas

la interesojn de iu klaso : ĝi celas la kompletan liberigon de l'homaro nuntempe servutigita laŭ la triobla vidpunkto ekonomia, politika kaj morala. Ni do gardu nin kontraŭ ĉiu unuflanka kaj simplisma agrimedo. La sindikatismo, bonega agrimedo pro la laboristaj fortoj, kiujn ĝi disponigas al ni, ne povas esti nia nura rimedo. Krome, ĝi ne forgesigu al ni la nuran celon alstrebindan : la Anarkion !

Eriko Malatesta.

(Esperantigis 30 151)

## MALATESTA
## PRI
## ESPERANTO

En la jaro 1924 k-do Lanti povis en Romo intervjui la faman anarkiston. Jen el malnova "Sennacieca Revuo", kion Malatesta diris pri esperanto :

- Ĉu do vi komprene legas esperanton ?

- Ja, vian revuon mi legas senpene. En Londono mi lernis esperanton kaj eĉ tiam tre interesiĝis pri la movado. Sed okazis la skismo ida kaj pro tio mi ĉesis okupiĝi pri la afero. Mi atendas ekscii, kiu el ambaŭ lingvoj venkos...

Mi (Lanti) profitis la okazon por klarigi, ke la esperanta movado daŭre progresadas kaj ne vidigas ian ajn dekadencan signon, tute male.

- Nu, eble denove mi interesiĝos pri esperanto, tial ke mi ja estas konvinkita, ke internacia lingvo estas nepre necesa por nia movado.

---

## I N T E R   K A M P A R A N O J

Jozefo : Saluton. Jam delonge mi volis paroli kun vi, tial ĝojigas min tiu ĉi renkonto. Vi tre ĉagrenas min, junulo. Ho, se vivus via patro !

Ĝordano : Per kio mi meritis viajn riproĉojn ? Kial mia patro ne estus kontenta pri mi ?

Jozefo : Mi estis la plej bona amiko de via patro kaj ni ĉagreniĝas, ke vi ne plenumas la esperon, kiun via patro havis rilate vin.

Ĝordano : Ĉu mi ne estas honesta laboristo ? Mi ĉiam faras ĉion por helpi al homoj. Mi faras ĉiujn eblajn penojn por kleriĝi kaj perfektiĝi. Per kio do mi meritis vian mallaŭdon ?

Jozefo : Vi estis jam kelkfoje malliberigita. Oni diras, ke la polico gardas vin kaj ke sufiĉas kunesti kun vi surstrate por havi malagrablaĵojn. Aŭskultu konsilon de maljunulo. Lasu la politikajn elturniĝojn al sinjoroj, kiuj havas nenian alian celadon. Prefere pensu pri laboro kaj bonfaro, kaj tiam vi vivos trankvile kun dia helpo. Forĵetu la malbonajn kolegojn : ili forkondukas la junularon de l'ĝusta vojo.

Ĝordano : Mi certigas vin : miaj kamaradoj estas honestaj laboristoj. Ni estis en malliberejo, vere, sed ni sidis por la venko de nia afero, por neniigi maljuston kaj mizeron.

Jozefo : Mi scias, ke estas malbone en la mondo. Sed ĉiam estis riĉaj kaj malriĉaj, kaj ni, kiuj naskiĝis por labori, devas kontentiĝi per tio, kion Dio sendas al ni. Se ni tion ne faros, ni perdos honoron kaj trankvilon.

Ĝordano : Bela honoro ! Por esti honestaj homoj ni devas, verŝajne, memvole toleri nian situacion, senplende. Kiam ni memoras pri tio, ke ankaŭ ni estas homoj kaj ke ni havas rajton uzi la fruktojn de nia laboro, tiam la ekspluatantoj nomas nin kanajloj. Ilia polico trenas nin en

malliberejon kaj la pastraro sendas nin inferen. Kredu al mi : veraj friponoj, homoj sen honoro estas homoj, kiuj vivas per perforto. Ili degradis la popolon ĝis brutaro, kiu trankvile permesas la tondadon kaj mortigadon.

Jozefo : Ĉio estas vero. Sed sen timo antaŭ Dio oni povas nenion atingi.

Ĝordano : Lasu Dion en trankvilo ! Ĝi estas nur rimedo de ĉiuj, kiuj volas trompi nin kaj eksplutadi. Dum milito ambaŭ regantoj anoncas, ke ili estas diaj delegitoj. Sed tamen venkas ĉiam tiu, kiu havas pli multe da soldatoj kaj estas pli bone armita. Eksplutantoj kun helpo de l' pastraro, je nomo de Dio, kondukas militon kaj faras ĉion, kio donas al ili plej grandajn profitojn. Laŭ ili, Dio donis al ili ĉion kaj al ni destinis mizeron kaj laboron. Al ili paradizo dum vivo kaj postmorto, al ni infero dum vivo kaj paradizo post morto, sed kondiĉe ke ni estos dum la vivo obeemaj sklavoj kaj ke en la paradizo por ni restos sufiĉe da loko.

Jozefo : Mi ankaŭ ne kredas al ĉiuj hostorioj, kiujn rakontas al ni la pastroj. Estas tiom da religioj, kaj ĉiu kredas, ke nur la propra estas la vera. Tamen neniu havas faktojn por aŭtentigi ĝian pravecon.

Ĝordano : Ne rakontu, ke Dio volas, ke vi laboru kaj malsatu, ke viaj filinoj estu konkubinoj de l'eksplutantoj. Hodiaŭ, kiam vi estas malriĉa, kondamnas vin Dio al malsato kaj mizero. Se vi sukcesos dank'al iu malvirta vojo atingi multe da mono, tuj Dio estos kun vi. Vi ricevos tuj la rajton ĝui sen laboro, eksplutai kamparanojn, malvirgigi malriĉajn knabinojn. Dio permesus al vi ĉion, kiel hodiaŭ ĝi permesas al nia mastro.

Jozefo : Mi estas maljuna kaj mi scias, ke tiu ĉi mondo estas hontega, sed tio ne rajtigas nin esti friponoj. Diru, ĉu vi vere volas forpreni de riĉuloj iliajn posedaĵojn.

Ĝordano : Ni ne forprenos, sed tiujn riĉaĵojn ni fordonos al komuna uzado. Farante tion la popolo ekposedos nur tion, kio devas aparteni al ĝi.

Jozefo : Bone. Sed provizore ĉion posedas la sinjoroj, kaj

krom ĉio ni devas danki al ili, ĉar sen ili ni ne povus vivi.

Ĝordano : Ili posedas riĉaĵojn, ĉar ili forprenis ilin de ni perforte. Sed laŭ la sama maniero, per kiu ili forprenis tion, ili povas esti devigotaj fordoni tion al ni. Jam urĝas, ke tio ŝanĝiĝu. Se ni ekkonsentus, ni povus organizi la vivon, tiel ke ĉiu fartu bone. Havante la regpovon, la sinjoroj kaptis ĉion, sed tiun potencon ni forprenos de ili. Kiam la laborista klaso unuiĝos, ĝi certe estos pli forta ol la riĉuloj.

Jozefo : Ĉu la teron kaj ĉion alian vi dividus al ĉiu aparte laŭ egalaj partoj ?

Ĝordano : Ne. Ni volas doni ĉion al ĉiuj. Ĉiuj devas labori laŭ povo kaj ricevi laŭ bezono. Plej bone estas labori en komunumoj, ĉar per eĉ malgranda fortostreĉo oni povas pli produkti ol aparte. Komunuma laboro ebligas maŝinuzadon, kiu ŝanĝas laboron en facilan kaj agrablan penon. La plej grava afero estas, ke neniu vivu per fremda laboro. Kiam ĉiu havos rajton je ĉio, kio estas necesa por laboro, neniu volos labori anstataŭ alia. Oni devos reguligi la produktadon, celante certigi al ĉiu ĉion plej necesan, kaj eligi el ĉiu la kiel eble plej grandan parton de liaj kapabloj per liberecana edukado. Sen tio estus perfortota la rajto de ĉiu al la laboriloj, ĉar fizika kaj spirita fortoj estas veraj laboriloj.

Jozefo : Sed, se la registaro dekretus bonajn leĝojn kaj devigus la burĝaron aliel trakti la laboristaron ?

Ĝordano : La registaro konsistas el sinjoroj, kaj sendube ili dekretos neniajn leĝojn kontraŭ si mem.

Jozefo : Mi komprenas. Vi volas organizi bonan respublikon. Ĉiuj estos egalaj. Kiu laboras - manĝu, kiu ne volas - mortaĉu !

Ĝordano : Respubliko estas tia sama registaro, kiel ĉiu alia. La diferenco estas nur tiu, ke anstataŭ reĝo estas prezidanto, aŭ nur ministroj kun parlamento. Mizero kaj sklaveco restas. Sinjoraj delegitoj antaŭ la elekto al parlamento promesas or-montojn. Sed poste, kiam ili estas jam elektitaj, oni eĉ ne vidas ilin. Tio estas nur trompo.

Tiom longe, kiam ekzistas ekspluatantoj, ili regos ĉiam. La popolo estas malklera, superstiĉa kaj balotas ĉiam por tiuj, kiujn montras al ĝi la registaro aŭ pastraro. Ĝi agos tiel ĝis la momento, kiam ĝi akiros ekonomian sendependecon kaj klaran komprenon pri la propra stato. Por ke infano lernu iri, oni devas permesi al ĝi mem tion fari kaj ne timegi, ke ĝi iam falos.

Jozefo : Sed ĝis infano lernos iri, estas por ĝi necesa patrino, registaro ?

Ĝordano : Registaroj je nenio similas al patrino, ĉar ili ne fortigas kaj ne perfektigas la laboristan klason. Eĉ kontraŭe. Ili kuniĝas kun la popolo nur tiam, kiam ili deziras ĝin denove ekspluati. Laŭ propra iniciato la popolo agadus certe pli bone. Ĝi kuniĝus en komunumojn landajn kaj internaciajn, kaj tiuj organizus la tutan socian kaj ekonomian vivon sen iu registaro.

Jozefo : Sed kiam venos tiu perfekta soci-ordo ? Mi jam estas maljuna kaj mi ne volus morti ne vidinte almenaŭ unu tagon de l'Justo !

Ĝordano : Tio dependas nur de ni. Ju pli ni klerigos la laboristan klason, des pli rapide alvenos revolucio. Ni plifortigu la propagandon, unuiĝu, eluzu ĉian malkontenton, ĉiun movadon, ĉiun ribelon. Tiam rapide falos la burĝa konstruo kaj alvenos federeca soci-ordo !

Jozefo : Vi konvinkis min. Se nun la sinjoroj nomos min "krimulo", mi diros al ili : "Laboru kiel mi. Tiam vi havos rajton prediki moralaĵojn."

Eriko Malatesta.

(Kompil-traduko de 20.445)

Noto de LJP-broŝurservo : Tiu ĉi teksto aperis en "Senŝtatulo", n-roj 471 kaj 472 (nov.dec.1938).

---

Gérant & imprimeur : Baudé, 47340 Laroque